

Salo kaj lumo

Jesuo Kristo diras en la montoprediko al siaj disĉiploj (Sankta Mateo 5.13-14):

13. Vi estas la salo de la tero; sed se la salo sengustiĝis, per kio ĝi estos salita? ĝi jam taŭgas por nenio, krom por esti elĵetita kaj piedpremita de homoj.

14. Vi estas la lumo de la mondo. Urbo starigita sur monto ne povas esti kaŝita.

Jesuo alparolas jen fizikan efekton, kiu kiel fenomeno koniĝis plej malfrue ekde Moseo, tio estas, ke kuirsalto kolorigas ĉiun flamon flave kaj oranĝe. La preciza koloro en la fiziko doniĝas per la ondolongoj 589,5923 nm kaj 588,9953 nm ([1993BSN], tablo 2.1, paĝo 209). Ĉi tio estas la koloro de la natriovaporolumiloj ĉe kelkaj zebrostrioj.

Moseo taskita per Dio ordonis, ke ĉiuj oferoj devas enhavi salon (Levidoj 2.13). La interrilaton de salo kaj lumo en la fajro tial la disĉiploj de Jesuo konis dume la montoprediko.

Kiel studento la verkinto havis fornon por petrolo en sia ĉambro kaj tie li elprovis iam, kion kaŭzas salo en fajro. La rezulto estis miriga:

Sufiĉas malmultega salo por ŝanĝi la flamokoloron de aliakaze blua al flava. Krome la verkinto registris, ke la fulgo en la forno kontinue malkreskis kaj iam eĉ en la fumtubo malaperiĝis. En la forno restis ruĝa rusto purigita de fulgo, la verkinto povis depecigi ĝin komferte per la mano, kio signifas esence pli malmulta malpuraĵo ol la forigado de fulgo. Post la purigado la flamingoringo, de kio normale la flamoj eliras, aspektis preskaŭ kiel nova, ĉe kelkaj lokoj jam la metala brilo de la fero ekkonebliĝis, purigita en fajro.

Moseo certe ordonis, ke ĉiu militokaptaĵo, kio estas fajrorezista, estas purigenda en fajro (Nombroj 31.23). Salo kaj fajro ne tuj ĉiun metalon fandigas, sed ĝi nepre purigas la metalon. Salo kaj akvo kontraŭe progresigas la ruston. Oksidita metalo sen salo precipe en plasmobrulejo per eminenta energiuzo puriĝas (reduktiĝas, [2002Blu]). La kemiistoj la salon en la akvo kaj en la fajro nomigas kiel *katalizilo* (vidu [1987MM], ĉapitro 14.8., paĝo 246 ff).

Do la katalizan funkcion la Sinjoro Jesuo planis por siaj disĉiploj. Eble vi ankaŭ iam demandis: »Kion mi kiel kristano sole en mia familio, en mia lernejo aŭ ĉe mia laboroloko aranĝu?« La respondo estas tre simpla: Ni »lumu« en la fajro de la disputo en la senco de la beatifikacioj (Sankta Mateo 5.3-12), nome per mildeco, kompatemo kaj pacemeco respondu al ĉiuj malordoj de nia vivo. Ĉi tiu havos efekton kiel salo en fajro.

Urbo sur monto jam estas videbla el tre longa distanco. Ekzemple la urbo Schillingsfürst [Ŝilingsfirst] inter Rothenburg ob der Tauber [Rotaburg' ob da Taŭba] kaj Ansbach [Ansbaĥ] plej multe nur per binoklo estas videbla de la Aalena Aalbäumle [Olama Albojmle]. Nur malofte la tegmentoj de Schillingsfürst [Ŝilingsfirst] lumiĝas per la brilanta suno, tiam eĉ per nura okulo lumanta ruĝa punkto ĉe la horizonto de la Aalbäumle [Albojmle] (kun turo 702 m super la maronivelo) estas ekkonebla.

Jesuo Kristo diras (Sankta Johano 3.12):

12. Se mi aferojn surterajn diris al vi, kaj vi ne kredas, kiel vi kredos, se mi diros enĉielajn?

Pruvo de la fontoj, ĉiuj datoj estas post Kristo

[1978Zam]

(Lazaro Ludoviko) Zamenhof kaj aliaj: *La Malnova Testamento el la hebrea originalo tradukita, La Nova Testamento de nia Sinjoro kaj savanto Jesuo Kristo*, La biblioteksto valoras kiel komplete finadita ekde la sinodo en Karthago (Kartago), (0397); Zamenhof kompletis sian tradukon en (1917), Brita kaj alilanda Biblia societo, Londono; nacia Biblia societo de Skotlando, Edinburgo, (1978)

[1987MM]

(Charles E.) Mortimer [(Ĉarls I.) Mortima], (Ulrich) Müller [(Ulriĥ) Mila]: *Chemie – Das Basiswissen der Chemie – Mit Übungsaufgaben (Kemio – La bazoscio pri la kemio – Kun ekzercotaskoj)*, Georg Thieme [(Georg) Time] Verlag (editejo), Stutgarto, Nov-Jorko, 5-a komplete nove redaktita kaj pliarĝigita eldono, (1987)

[1993BSN]

(Ludwig) Bergmann [(Ludvig) Bergman], (Clemens) Schaefer [(Klemenc) Ŝefa], (Heinz) Niedrig [(Hajnc) Nidrig]: *Lehrbuch der Experimentalphysik (Lernolibro pri eksperimenta fiziko)*, volumo **3 Optik (optiko)**, Walter de Gruyter [(Valta) de Grujta], Berlino kaj Nov-Jorko, 9-a eldono, (1993)

[2002Blu]

(Rolf-Dieter) Blumer [(Rolf-Dita) Bluma]: *Persona informo al la verkinto*, landooficeo por monumentoflegado Baden-Württemberg [Baden-Virtemberg'], pozicio Schwäbisch Gmünd [Ŝvebiŝ Gmend], (2002)

[2011Süd]

(Norbert) Südland [(Norbert) Zidland]: *Prediketo por la trombonoĥoro de Aalen [Ola]*, Aalen [Ola], (2011)